

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE

c.c.p. Association Catholique Française pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2,50 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. ====

XX

---- N° 113 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

--- JULIO 1977 ---
=====

XX

BILETO DE LA PREZIDANTO.

En ce temps de Pentecôte, notre méditation nous conduit naturellement vers cette foule de Jérusalem, soudain éveillée par le souffle puissant de l' Esprit, entendant dans toutes les langues de la diaspora, chacun dans son propre dialecte, l' annonce de la Bonne Nouvelle.

A son tour, l' image de l' Audience Papale de l' Année Sainte 1975, où, congressistes espérantistes, nous formions un groupe important parmi l' immense foule venue de tous les continents, s' impose à ma mémoire: le Saint Père, accueillant et exhortant les chrétiens venus de l' Asie, de l' Afrique, du Canada et des deux Amériques, s' est exprimé dans plusieurs langues nationales, toutes étrangères pourtant à un grand nombre de présents.

Combien plus forte cependant a été l' impression de ceux qui ont entendu et compris directement les paroles du Souverain Pontife.

Nous avons eu la joie de recevoir les encouragements qu' Il a adressés à notre idéal de compréhension, de paix universelle et d' amour chrétien.

Mais nous avons senti quel progrès serait réalisé si une langue unique, comprise de tous, permettait ce contact direct auquel nous aspirions tous en présence du successeur de Pierre.

Pour qu' un jour, nous nous sentions plus proches les uns des autres, plus unis à ceux qui sont porteurs d' un message universel, il faut qu' une ample action soit menée dans tous les pays. Mais le point important, puisqu' il s' agit d' une langue, c' est que celle-ci ait droit de cité et soit accueillie dans l' enseignement, qu' elle soit apprise par des jeunes dès l' âge scolaire et pratiquée.

Au cours de notre congrès de 1977, nous avons été honorés de la visite de Monsieur le Maire de La Houssaye et nous tenons à l' en remercier. Ancien officier de marine, grand voyageur, il comprend mieux que personne l' intérêt de la Langue Universelle. Il a promis de faciliter dans sa commune toute initiative tendant à faire connaître et à enseigner l' Esperanto.

Chacun des événements qui nous mettent en contact avec les autorités civiles et religieuses devrait donner lieu à semblable démarche, qui devrait avoir pour suite, si possible, la création de cours ou tout au moins la diffusion d' indications sur les cours existants, notamment à l' adresse des plus jeunes.

C' est la diffusion de la Langue Internationale qui conduira les responsables des moyens de communication sociale à lui donner une place plus grande

.. / ...

la l' information, et ainsi à l' ouvrir à de plus vastes auditoires par delà
s. frontières. L' expérience menée par Radio Vatican est un exemple que nous
souhaitons voir s' amplifier, du contact direct du Vatican avec les chrétiens de
tous les pays.

René-Claude COLAS.

=====

A TOUS LES PRETRES, RELIGIEUX ET RELIGIEUSES ...

Un cours gratuit d' Esperanto par correspondance vous est spécialement
destiné. Ecrivez à M. RIBOT 11, rue Vergnes 47200-MARMANDE, qui vous enverra le
livre et les disques nécessaires contre 10 F en timbres et assurera ensuite la
correction de vos exercices. Vous pouvez être assurés d' une étude sérieuse et
soigneusement contrôlée, car M. RIBOT est professeur de langues dans un collège
et diplômé des Hautes Etudes Espérantistes.

=====

RAPORTO PRI LA JARKUNVENO DE LA 10-a DE APRILO 1977 EN LA HOUSSAYE EN BRIE.

1. Nia prezidanto S-ro Colas malfermas la kunvenon, kiu komenciĝas per preĝkanto.
2. F-to Marmou bonvenigas la kongresanojn en sia priorejo, akcentante pri la ĝoj-
iga Paskfesto.
3. 22 homoj ĉeestas; 42 el kiuj du el Hungarujo, perletere salutis kaj bondeziris
al la kongreso.
4. Nia prezidanto prezentas la agadraporton, diras funebrajn vortojn pri S-to
Paruzel kaj S-ro Chapellier, atentigas la ĉeestantojn pri la ĉiudimanĉa elsen-
do de Radio Vatikano.
5. S-ino Vincent raportas pri financoj, kies bilanco montras profitan saldon.
6. Ambaŭ raportoj estas unuanime aprobitaj de la 53 voĉdonantoj el kiuj 41 estis
rajtigitaj perantoj. Triono de la konsilantaro estas reelektita ankaŭ unuanime.
F-ino PREUX, S-inoj MICHAU kaj VINCENT, S-ro VERON.
7. Pri la bulteno, ĉiuj konsentas, ke la enhavo estas interesa kaj aparte ŝatata
la "Bileto de la Prezidanto". S-to Bourdon sugestas, ke oni aldonu krucevortojn.
S-ro Colas varme dankas la redaktorinon, S-ino Vincent kaj la eldoniston, F-to
Marmou pro ilia valora laborado.
8. Oni proponas, ke la venontjara kongreso okazu printempe en Tours; S-ro Lecocq
konsentas kontakti religian domon por eventuala akcepto.
9. La rilatoj inter FKEA kaj IKUE ne estas tre kontentigaj: la IKUE-kongresoj ne
sufiĉe pritraktas la movadajn aferojn; oni petas, ke la francaj IKUE-komitata
anoj postulu, dum la kongreso en Ĉenstofiŝova, almenaŭ unu kunvenon en la jaro
krom la dumkongresan. S-ro Colas sugestas, ke oni starigu internacian komita-
ton por la redakcio de EK.
10. S-ro Despiney prezentas la novan informilon, komuna al Evangelia Ligo kaj
FKEA, celantan la junularon; ĝi estis elektita inter du provoj pro malpli gran-
da kosto. S-ro Despiney estas dankata pro sia senlaca sindonemo.
S-to Degrelle klarigas siajn klopodojn pri tradukado, en kunlaboro kun S-ro
Bernard, kaj eldono de nia kantikaro, kies sendado kovros la tiurilatajn els-
pezojn se ĝi estos grandkvanta.
11. S-to Bourdon transdonis la francan tradukaĵon de la verko de S-to Korytkow-
ski fare de S-ro Ribot al siaj kunfratoj, kiuj pristudos la aferon; belga sam-
ideanino informiĝos ĉe belga eldonejo pri eventuala eldonprezo de la koncerna
tradukita verko.
12. S-to Bourdon gvidas kurson en Roubaix kun 9 lernantoj, el kiuj unu ĉeestas
la kongreson; S-ro Lecocq gvidas perkorespondan kurson sur fervojista kampo
kun 63 lernantoj el kiuj 7 finlernis kaj 28 daŭrigas la lernadon.
13. S-to Bourdon invitas al la pilgrimo de Nia S-ino de Bona Helpo en Peruwelz
(Belgujo) la 4-an de septembro 1977 kaj al Esperanto-tago dum la fervojista
pilgrimo en Lourdes en septembro.

La ĝenerala kunveno decidas la translokiĝon de la sidejo de la asocio de
Les Andelys al Baugé; ĝi rajtigas la kasistinon ŝanĝi la titoligon de la poŝt-
ĉekkonto kaj transporti la rezervan kapitalon de la ŝparkaso en Les Andelys
al tiu en Baugé.

Protokolis S-ino J. MICHAU.

LINGVA ANGULO

Riĉa respondaro venis post la apero de n° 112, nome de S-roj Bourgois, (B), Dauchez (Da), Despiney (De), Guillon (G), Le Marquand (L), S-ino Michau (M) kaj la Nantes-a kvinopo (5). Jen iliaj tradukoj:

- 1) il donnerait sa chemise: li pro malavareco seniĝus je ĉio, li estas tro donema (B); pro malavaremo, li donacus eĉ sian ĉemizon (Da); li estas senlime malavara(De); ĉion li helpeme fordonus (G); li donacus ĝis nudiĝo (M); li donus eĉ sian ĉemizon, li donus eĉ la lastan paneron (5); li helpeme senigus sin ĝis sia ĉemizo (L).
- 2) on lui donnerait le bon Dieu sans confession: lia aspekto ŝajniĝas fidindecon (B); li ŝajnas plej konfidinda (Da); li ŝajnas tute senpeka (De); oni ŝatus (?) lian konduton bonega (G); oni miskredus lin senpeka (M); al li ne konfesdoninta, oni donus komunion, li ŝajnas snktulo, senpeka (5); oni konfidas al li sen garantio (L).
- 3) dorer la pilule: mistifiki, loqtrompi (B); kvazaŭ orumi (?) malbongustan pilolon (Da); per afablaj vortoj prezenti malagrablaĵon (De); parole plibonigi la aferon (G); kamufli la amarecon (L); ŝajniĝi dolĉa acidaĵon (M); bonaspektigi, beligi aŭ origi(?) la pilolon (5).
- 4) dormir en chien de fusil: kruroflekse dormi, dormi kun fleksigitaj kruroj (B); dormi, envolvite kiel erinaco (Da); ŝrumpo(?) dormi (De); dormi kun fleksitaj genuoj (G); ĉanforme dormi (L); dormi kaŭrpozicie (M); dormi kiel feti en ovo, kiel pafila ĉano (5).
- 5) faire double emploi: kromekzisti, superflue anstataŭi (B); esti senutila duoblaĵo (Da); senutile anstataŭigi ion (De); vidiĝi neutila duoblaĵo (G); esti senutile ripetita (L); duobligi servon (M); esti dua ne utila ilo aŭ persono por sama uzo, esti troe (5).
- 6) se dresser sur ses ergots: ekspiti, aroganti (B); arogante stariĝi kiel koko (Da); iĝi minaca (De); adpti minacan sintenon (G); kokeske ekstari (L); bataltprete, atakeme elleviĝi (M); provoke ekstari (5).
- 7) un drôle de zèbre: strangulaĉo, (sentaŭgulo (B); strangulo (Da, De); stranga homo (G); neordinarulo bizarulo (L); vigla bubaĉo (M); stranga ulo (5).
- 8) un dur à cuire: hardito (B, L); nelacigebla (Da); nenio timigas lin (De); malfacile influebla homo (G); eltenemulo (L); rezistegemulo (M); malfacile skuebla, ne moligebla (5).
- 9) dur à la détente: pagidomaĝema, avara, neelspezema (B); retenema de sia mono (Da); nedonacema (Da, De); avarulo (De); ne donema (5); mondomaĝema (L).
- 10) il l' a échappé belle: bonŝanco savis lin, li eskapis el grava danĝero (B); li, bonŝance, evitis danĝeron (Da); la danĝero maltrafis, preterpasis lin (De); li neesperite evitis malfeliĉon (G); li tanĝe je hareto, je nenieto eskapis (L); li eskapis ĝustatempe (M); li bonŝance eskapis, li havis nur striktan eskapsacon (5).

La nova klasifiko estas jena:

- 1) S-ro BOURGOIS (16 poentoj); 2) en egaleco: S-ro LE MARQUAND kaj S-ino MICHAU;
- 4) S-ro GUILLON (9 poentoj); 5) S-ro DESPINEY (7 p.); 6) S-ro DAUCHEZ (6 p.);
- 7) en egaleco: S-roj DE SALVO kaj RIBOT (5 p.)

N.B.: S-ro LE MARQUAND kaj S-ino MICHAU havas 15 poentojn.

Novaj esprimoj proponitaj de S-ro Lecroisey: 1) rouler sur les chapeaux de roue; 2) être sur les dents; 3) avoir quelqu' un à l' oeil; 4) ah! la barbe! 5) mon oeil! 6) par les temps qui courent; 7) nom d' un chien! 8) j' ai le nez pris; 9) conduire par le bout du nez; 10) j' en ai plein le dos.

RADIO ROMA ESPERANTO

KURIERO DE ESPERANTO

(redaktis Antonio DE SALVO)

INTERNACIA GEEDZIĜO: ni ricevis plaĉan anoncon pri geedziĝo en tri lingvoj (hungara, Esperanto kaj ĉeĥa); ĝi diras: "Eva TOFALVI kaj Oldřich KNICHAL kore invitas vin kaj vian ŝatatan familion partopreni ilian geedziĝan feston, kiu okazos la 18-an de junio 1977, je la 12.30 en la 1-a Centre Geedziĝosalono (Budapest, VI

.. / ...

Lenin Krt. 67)".

Al la geedzoj (el kiuj, aparte konata en la Esperanto-medio estas Oldřich KNICHAL, lerta redaktoro, tradukisto kaj organizanto) ni sendas niajn plej varmajn gratulojn kaj bondezirojn.

NOVAĴOJ EL ITALUJO

Teksto de CARANDINA, traduko de Antonio DE SALVO

En LAPEENRANTA, Finnlando, estis ĵus inaŭgurita elektra centralo kun potenco de 170 mil kilovatoj, projektita kaj instalita de la itala entrepreno FIAT. Temas pri elstara ekzemplo de internacia kunlaboro en la industria kampo, malgraŭ la diverseco de politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj: fakte, la alternatoroj estis liveritaj de Hungarujo, la kaldronegoj de Finnlando, kaj la gasturbinoj de Pollando.

La specialaj turbinoj, projektitaj de FIAT (kaj fabrikitaj en Pollando) altiris la atenton de la specialistoj, pro la originaleco de la alprenita solvo: ili kapablas, ja, ekspluati ankaŭ la varmon entenan en la ĉi forĵeta gaso, kaj per tia rimedo ili liveras varman akvon en kvanto sufiĉa por hejtigi tutan kvartalon. Elektro kaj varmo estas tiel produktataj kun granda ŝparo de brulaĵoj, kaj sen malpurigo de la aero.

+++++

POPOLO MIA, JEN KION MI FARIS.

Mi, Di' de l' Ĉiela trono
faris min mizera homo:
konsumaĵ' por fastmalsato,
nazareta forpelato,
metis min sub viajn leĝojn,
migris dum varm' kaj pluvneĝoj,
por ke rimarku min, kiuj
rigardas, tamen ne vidas.

Mi, Majstro, iris kun trabo
supren al la mortetapo
kaj eĉ pli alten, sur krucon...
kaj eĉ pli funden, sur krucon...
Jena estis mia trono
sur ĉiel- kaj inferfono,
por ke rimarku min, kiuj
rigardas, tamen ne vidas.

Mi altan la tabernaklon
forlasis por ke spektaklo
estu pri mi: al vipado
mi donis min, mokparadon
ruĝmantele, en dornkrono
faris dum la pasiono,
por ke rimarku min, kiuj
rigardas, tamen ne vidas.

- Sinjoro,
al Viaj okuloj
mi sendas peton je l' beno
por la gapuloj
pri Via veno.
Ja ili estas miopaj,
Sinjoro!

Jeĵi PODBIELSKI

+++++

PREGO

Donu al mi bonan digestadon,
Sinjoro, kaj ankaŭ ion digestotan.
Donu al mi la korpan sanecon kun la talento
Ĝin gardi kiel eble plej bone.
Donu al mi, Sinjoro, sanktan animon, kiu
turnos la rigardon al beleco kaj pureco, por ke
ĝi ne terurigu vidante la pekon, sed sciu
rektigi la situacion.
Donu al mi animon, kiu ignoras enuon, ĝemadon kaj sopiradon.
Ne permesu, ke mi tro zorgu pri tiu ĝena aĵo,
kiun mi nomas mi.
Sinjoro, donu al mi humuron por ke mi
eltiru ian feliĉon el ĉi tiu vivo kaj ĝin
transdonu al la aliaj. Amen.

Thomas MORE.

+++++

KONSILIA KUNVENO: Ĝi okazos la 25-an de septembro 1977 de la 10-a ĝis la 17-a horo ĉe la UFE-sidejo 4bis, rue de la Cerisaie 75004-PARIS. Observantoj bonvenaj.

FKEA- KONGRESO 1978

Ĝi okazos en TOURS la 15/16-an de aprilo. Nia amiko S-ro LECOCQ jam vigle preparas la restadon de la kongresanoj en sia urbo. La oktobra numero de FKE alportos al vi pliajn informojn, sed jam nun rezervu tiujn datojn!

LUDANGULO

Dank' al grava sendaĵo de nia ĝiam vigla amiko S-ro OLIVAUX el Nantes, ni povos prezenti al vi kelkajn ludojn en nia oktobra numero. La redaktorino petas ~~ne~~ senkulpigon pro tiu prokrasto, sed pro sia ĵusa emeritiĝo kaj definitiva transloĝiĝo, ŝi ne povas prizorgi la delikatan teĥnikan flankon de la afero.

LA ANGULO DE LA KASISTINO

Ankoraŭ kelkaj forgesemuloj ne pagis sian kotizon por 1977. Ili bonvolu tion fari TUJ por ne forgesi. Bona sistemo estas iĝi dumviva membro.

KOTIZTABELO 1977

IKUE kun "Espero Katolika" 30 F
Peranto: R. Degrelle c.c.p. Nancy 714 95 P.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 10 F
(infanoj ĝis 16-jaraj, sacerdotoj, religiul(in)oj) 5 F
Membro bonfaranto 50 F
Dumviva membro 200 F

UFE kun "Revue Française" 70 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 92 F
Assoc. Cath. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. Rouen 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" 30 F
Peranto: G. Baudry c.c.p. Lille 4704 43.

Dépôt légal: 3ème trimestre 1977 /// Polycopié par F. M. C.
Papier de presse n° 34 745 /// Prieuré St-Martin
Directeur-gérant: Gaston VERON /// LA HOUSSAYE EN BRIE
77610-FONTENAY TRESIGNY

FRANCE
